

M O F E T O

Karbodioksida gasbanejo en Mátradereske

Aktivado post vulkanerupcio kutimas okazi gaseliĝo. La komponantoj de tiu gaso tra la haŭto povas difundi en la sangon kaj tiel fari kuracan efikon. La geologistoj tiun fenomenon nomumas *mofeto*, kies komponantoj dependas de la geologiaj cirkonstancoj.

Laŭ nia nuna scio la karbodioksida seka banado estas uzata jam de 2000 jaroj. Oni rekonis ties resanigan efikon en la kuracado jam dum la romia epoko kaj poste uzis tiun ankaŭ la popolkuracantoj. La terapioj okazis unue en naturaj kavoj, poste en artefaritaj banejoj (dum la romia epoko en teatroformaj basenoj).

Temas pri kompleksa efiko, ja krom vejnolarĝiga influo de la altkvanta enhavo de CO₂ (karbodioksido), la diverskvantaj sulfuro kaj radono same havas tre bonajn kaj konatajn kuracefikojn.

En Hungario la unika mofeto estas trovebla en Mátradereske.

Tiu vilaĝo situas sur la orienta deklivo de la monto Mátra, havanta distancon 120 km-ojn de Budapeŝto kaj 30 km-ojn de urbo Eger. La loĝantonombro de la vilaĝo estas nur 2300, sed la naturaj valoroj estas tre riĉaj. En la vilaĝo la akvokvalito de termalbanejo egalas proksimume kun la termalakvo de Bükkszék, la aero estas pura kaj la panoramo estas belega.

La loĝantoj de la vilaĝo ellernis kunvivi kun la gaseliĝo dum jarcentoj, sed kontraŭ tio okazis malbonfartoj en pli profundaj keloj kaj kavoj eĉ kaŭzis morton de dombestoj kaj okazis tragedio dum fosado de putoj. La karbodioksida enhavo de la fositaj putoj estis konataj jam ekde la 1930-aj jaroj.

Loĝantaj atentigoj informis pri la aktivado de la gaseliĝo en la jaro 1992. Pro tio oni faris esplorojn geologian, kemian, fizikan, radiologian kaj resanigan por ekkoni la efikojn kaj la eblecojn uzi la gason en la kuracado.

La enhavo de la gaso:

Oksigeno	O ₂	1,61	vol %
Nitrogeno	N ₂	7,13	vol %
Metano	CH ₄	5,11	vol %
Karbodioksido	CO ₂	86,16	vol %

(Akvoexplora Akvokemia Kft.)

La radonenhavo en la gaso estas ²²²Rn/125 kBq/m³ (MTA ATOMKI)

La gaso en Mátradereske devenas el la trias-eraa tavolo rompita, enhavanta tiu tavolo ankaŭ karstakvon. Averaĝa kvanto de la gaseliĝo estas 400 l/h, kiu atingas le tersurfacon tra la eocenvulkana andezit- kaj sedimenta tavoloj.

Mátradereskei Széndioxid Gyógyászfürdő

3246 Mátradereske, Mátyás király u. 19/a. Tel.: 36/576-200, Faks.: 36/576-204

E-poŝto: mofetta@mofetta.eu TTT: www.mofetta.eu

Laŭ la esploroj la Sanitara Ministerio kaj la Landa Kuracbaneja Direkcio taksis la eliĝan gason *kuracefika* en la jaro 1999 kaj donis kvalifikon *kuracbaneja instituto* por la kuracada centro.

Por kiuj malsanoj estas uzebla la mofeta terapio?

Bonege estas uzebla kontraŭ la vejnaj kaj arteriaj problemoj de membroj kaj kontraŭ malsano de kronikaj limfaj angioj. Same estas bone uzebla por kuraci la sekvaĵojn de la vejnoinflua diabeto kaj post operacio, simpatektomio, kunkatetera vejnolarĝigo, enplanto de steno, krome rezultigas tre favorajn efikojn en tiuj okazoj, kiam ne eblas operacii. Estas konvinkaj tiuj pozitivaj rezultoj, kiuj estas sperteblaj en la terapio kontraŭ la *Raynaud* sindromo. Krom la vejnaj malsanoj, post trombozaj sindromoj kaj perturboj en la limfocirkulado, estas atingebla bona rezulto ankaŭ ĉe la lante resaniĝaj membroulceroj.

Krom la cirkuladperturbaj membromalsanoj estas tre bonaj la spertoj pri la terapio ankaŭ post traŭmaj sekvaĵoj.

En kiuj okazoj ne estas proponata?

La kontraŭaj proponoj de la karbodioksida terapio egalas kun tiuj de la termalbanejaj. Tiuj estas: insufiĉenco cirkulada, ne stabila brustangino, korinfarkto, encerba trombozo, post cerba hemoragio dum tri monatojn. Ne estas propona por tiuj, kiuj havas emon por trombozo, pulmoembolo, inflamaj malsanoj kaj ofta sveniĝo. Pri terapioj de la plijuna aĝo ol 14 jara oni ne havas sperton.

Por la karbodioksida terapio estas bezonataj la sekvaj medicinaj konstantaĵoj:

1. Laboratoriaj (ne pli malfruaj ol unu monato)
2. EKG kontrolo
3. Radiologia (ne pli malfruaj ol unu jaro)
4. Kopio pri kuraceja(j) delasodokumeto(j)

Tiujn dokumentojn bonvolu sendi al la direkcio de Mofeto kun indiko de la planita tempo komenci la terapion. En tiu okazo, se vi bezonas loĝejan servon, bonvolu tiun vi mem aranĝi post nia reago favora.

La kuracado okzas laŭ sanigada periodo, po tage kun unu terapio kaj tio daŭre dum 15 tagoj. Unuafoje la malsanuloj dum 15 minutoj sidas en la gaso, havanta tiu nivelon ĝis la talio, poste la tempo atingas la 25 minutojn. La gaseliĝo estas daŭra, kies nivelon indikas la estingo de kandeloflamo. Por la terapio estas bezonata senhalta kuracista kontrolo kun medicina fakpersonaro. Ni proponas vestaĵon el kotono kun ŝuo ne fermita, sed bone fiksigebla.

Se estas bezonata ni afable donas pluajn informojn pere de ajna atingebleco.